



LA FERVOJISTO

ITALA FERVOJISTA
ESPERANTISTA ASOCIO

A. I. F. E.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Dopolavoro Ferroviario - Via XX Settembre 17
VERONA (Italia)

INFORMA BULTENO

N° 15 = Decembro 1952a

1953

Estas finiĝonta la 1952a jaro, kiu por ni italaj esperantistoj signas unu paŝon antaŭen, ĉu pro la ricevita permeso instrui Esperanto en la publikaj lernejoj, ĉu pro la disvastiĝo kaj plifortiĝo de nia "Itala Esperantista Fervoja Asocio".

Kaj se pro tio ni konsideras nin kontentigitaj, tamen ni ne povas samtempe esti sen ia priokupo pri la proksima estonto.

Kion portos al ni la nova jaro, la 1953a ?

Ĉu ni havos alian interrompon en la disvolvo de la Esperanto-disvastiĝo, ĝuste kiam jam estas sin antaŭanoncintaj promesantaj fruktoj post jaroj de senĉesa, peniga laboro?

Ĉu la 1953a estos la jaro en kiu oni estos elektinta la vojon por la konservado de la paco, aŭ ĉu ĝi portos novan terurigan militon?

Jen demanda punkto, kiu je la antaŭtago de l'nova jaro, turmentas la animon de la tuta homaro, kaj ne estas sen kaŭzo ke ĉi tiu demanda punkto altrudiĝas al ĉiu el ni, kontraŭ la disvolviĝo de la nuntempaj okazajoj.

Ne estas nia tasko pritrakti pri la respondeco de tiu, kiu reduktis nin en tiaj kondiĉoj, sed tamen ni povas diri laŭte kaj forte, ke nia homara sento de malnovaj esperantistoj, devigas nin sciigi ke ni ne volas ke aliaj voĉoj pri teruregaj buĉadoj venu detrui, ankoraŭ pli ol niajn domojn, ĉi tiu nian civilizacion, kiu tion donis kaj kiu ankoraŭ povas doni al la tuta mondo, se ni scias ĝin adapti al la modernaj postuloj de la popoloj loĝantaj en Eŭropo.

Estas bondezira krio la nia, tre viva bondezira, kiun ni turnas ne nur al niaj gesamideanoj de ĉiu lando, sed al ĉiuj homoj de ĉi tiu terglobo, tial ke la 1953a jaro alportu al ili - spite ĉiu malbona antaŭ vido - tiun pacon, kiu sola povas doni laboron kaj la ĝojon vivi en trankvileco kaj en komuna bonstato.

Gesamideanoj, vivu la paco, vivu la laboro!

LA REDAKCIO

==/o=/o=/o=/o=/o=/o=/o=/o=/o=/o==

GESAMIDEANOJ, NI DEZIRAS AL VI, BONAN JARON 1953an !

NACIA KONGRESO de "F.F.E.A."

La 29an de la pasinta monato oni akceptis la delegitojn de la esterlandaj Asocioj, kiuj laŭ invito de "F.F.E.A." (Franca Fervoja Esperanta Asocio) partoprenis la Nacian Kongreson. Ili estis la samideanoj: Ing. NANNI el Italio; Sro BERGEN el Austrio; Sro DE BRUYNE el Belgio; Sro C.S. PARRY el Anglujo; Sro BACKER el Nederlando, kaj Sro HANS BIPP el Svisujo, kiuj ĝuis akcepton pli ol kora, vera frata.

La sekvantan tagon (EO/XI), je la 9.30 horoj, komenci ĝis la Kongreso, kies Prezidanto estis fraŭlino LEMONNIER, kaj Sekretario Sro REBHAULT.

Fraŭlino LEMONNIER salutis la kunvenintojn, dankis kaj salutis la ĉeestantajjn eksterlandajn reprezentantojn, precipe la belgian reprezentanton pro tio, ke la Belgia Asocio estis la lasta kiu aliĝis al "I.F.E.F." familio.

Post estis leginta la saluton de la Fervoja Administracia Representanto, ŝi legis la nomojn de la "F.F.E.A." mortintaj membroj, kaj ŝi invitis la ĉeestantojn honori ilian memoron per ŝtariĝo kaj dumminuta silento.

Post ŝi raportis pri la situacio de la Asocio, kiun ŝi opinias entute kontentiga. Ŝi atentigis ke la rilatoj inter la "F.F.E.A." kaj la Fervoja Administracio fariĝas ĉiam pli favoraj je tia grado ke la lastenomita jam donis subvencion al "F.F.E.A." mem, kaj sendis sian oficialan reprezentanton al IVa Internacia Kongreso en Lindau, kiu pro la tre bona ĉmpreso ricevita ekkomencis la lernadon de Esperanto.

Ŝi atentigis pri la laboro farita de la Asocio por la Faka Terminara Komitato, sed ŝi ne mankis rimarkigi la tendencon uzi la du lingvismon Franca-Angla, kiu estas danĝera pro Esperanto, do jen tasko por la esperantistoj: batali kontraŭ tiu tendenco.

Ŝi remeroris la Esperanto-kursojn, kiuj estis faritaj de la membroj, kies nomoj ŝi diras ilin laŭdante pro ilia aktiveco kaj akiritaj sukcesoj, ekscitante la ĉeestantojn imiti instruintajn membrojn kaj ne tiujn, kiuj donas ekzemplon de malmulta aktiveco kaj ne interesiĝo por la Asocio.

Kiam la prezidantino finis paroli, ekparolis la sekretario REBHAULT, kiu atente aŭskultata de la ĉeestantoj, legis sian raporton pri la disvolvita laboro kaj pri la situacio de la Asocio, post tio la prezidantino invitas la eksterlandajn reprezentantojn esprimi ilian saluton al la "F.F.E.A." kion faris la ĉeestantojn laŭ alfabeto vico.

Sro H. BIPP, svisa, prenis la okazos por komuniki ke sia Asocio prezentis kelkajn modifajn proponojn je la "I.F.E.F." Statuto, kaj invitis la "F.F.E.A." fari same, sed la prezidantino ne povis akcepti la inviton, ĉar pri ĝi estas benio en la "Tagordo".

Parolis la kompilanto de la "FFEA" Bulteno, kiu per multa de energio kaj multe da spirito sin defendas kontraŭ la rimarkoj faritaj al li de ĉeestantoj.

Sro BACKER, nederlanda, varme petis la kunigitajn Asociojn sen

di al li Kviñ ekzemplarojn de iliaj Bultenoj kaj li sendos sankavante de sia Asocio al Ĉiu.

En tiu momento franca knabineto vestita per aŭtentika aŭstria kostumo, kiu estis gastigita en Austrio ĉe esperantistaj fervojistoj, sin prezentis kaj salutis en Esperantoo la kunvenintajn fervojistojn. Ŝi rikoltis unuaniman aplaŭdon de la ĉeestantoj.

Poste la kongresanoj pridiskutis pri la internaj financaj aferoj kaj balotis la novan Direktantan Konsilantaron. Fraŭlino LEMONNIER rikoltis la plej grandan nombron de voĉdonoj.

La bonesukcesinta Kongreso fermiĝis per saluto al forirantoj, poste interŝanĝado de klarigoj kaj informoj.

Malgraŭ la pluvo, kiu senĉese falis dum la du tagoj de lia restado en Parizo, nia reprezentanto Ing. NANNI esti tre kontenta pro sia tiera restado, pro la bonvena akcepto fare de la francaj kolegoj kaj pro la instruo, kiun li ricevis partopreninte ilian kongreson, kie interalie, oni ĉian parolis en Esperanto.

=====

VITA de "A.I.F.E."

Rendiamo noto a tutti i nostri soci, che la F.E.I. pubblica una sua rivista bimestrale "ESPERANTO". Mentre per i soci della A.I.F.E. non è obbligatorio l'abbonamento, tuttavia ricordiamo loro che il costo dell'abbonamento annuo è di L. 200.= e che sarebbe utile al movimento esperantista in genere, l'abbonamento di ogni buon sanideano ad essa rivista.

=====

VITA dei GRUPPI

BENEVENTO = Anche i soci di quella località sono attivi e non si adagiano sul rapido successo ottenuto. L'attività di quei sanideani ha ottenuto di poter disporre dell'aula adibita a scuola del personale, per iniziare un corso di Esperanto. Poi, a seconda della disponibilità di tempo, si radunano una o due volte la settimana per scambio di idee, di propositi di lavoro, per conversazioni in Esperanto. Ai sanideani di Benevento il saluto e l'augurio di buon lavoro, da parte della nostra redazione.

BOLOGNA = Ogni mercoledì alle ore 21, anche a Bologna, nella sede di quel D.L.F. vi è riunione dei Ferroviari Esperantisti, dove, oltre che perfezionarsi nella lingua parlata, si stringono sempre più amichevoli rapporti fra colleghi sanideani, si esaminano e si svolgono problemi interessanti lo sviluppo della nostra A.I.F.E.

=====

PRO MEMORIA

Con la chiusura del 2° Congresso Nazionale, si è chiuso anche l'anno finanziario 1951=1952 dell'A.I.F.E. Si invitano pertanto i soci a voler provvedere al versamento delle quote per l'anno 1952=1953, entro e non più tardi del 31 corrente mese.

==/o==/o==/o==/o==/o==/o==/o==/o==

LA TRI GUTOJ

Albo, la bona feino kiu zorgas pri la fianĉinoj, Albo, kiu loĝas en la pupila blua de l'virgulinaj sempekaj, pasante jam natene apud rozo, aŭdis sian nomon elparolatan de tri gutoj tremantaj. Proksimigante kaj sidigante en la roron de l'floro, ŝi demandis afable:

Kion vi volas de mi, gutoj brilaj? - Venu solvi demandon, diris la unua - Diru kion - Ni estas tri malsamaj gutoj, naskiĝintaj diversdeveno, ni volas, ke vi diru al ni, kiu estas la plej merita, kiu estas la plej pura. - Mi konsentas, parolu, guto brila. -

Kaj la unua guto tremante parolis; "ni venas el nuboj altaj, mi estas filino de l'grandaj maroj. Mi naskiĝis en la senlima oceano antikva kaj potenca. Vizitinte marbordojn kaj marbordojn, en mil fulmotondroj ahuegita, mi estis sorbita de nuboj. Mi iras ĝis la altaĵoj, kie brilas la steloj, kaj ruligante de tie, inter fulmoj, mi falis en la floron, en kiu nun mi ripozas. Mi reprezentas la maron.

- Esta nun, via vico, guto brila, diris la felino al la dua. - Mi estas la rozo kiu nutras la liliojn; mi estas fratino de l'opaloj lunbriloj, filino de l'nebuloj, kiuj sin malvolvas, kian la nokto mallumigas la naturon. Mi reprezentas la matenkrepuskon. - Kaj vi? demandis Albo la plej malgrandan. - Mi havas nenian indon - Parolu: el kie vi venas? - El la okuloj de fianĉino; mi estis rideto, mi estis kredo, mi estis espero, poste mi estis amo, hodiaŭ mi estas larmo.

La aliaj ridas je l'guteto, sed Albo, malfermante siajn brakojn, prenas ĝin kun si kaj diras: "Tiu ĉi estas la plej merita, tiu ĉi estas la plej pura. - Sed mi estis la maro!... - Kaj mi estis l'atmosfero!... - Jes, tremantaj gutoj, sed tiu ĉi esti la koro.... - Kaj ŝi malaperis en la bluaĵo, portante la humilan guton.

(El Coelho Netto Trad. Dr J. Avelar)

==j==j==j==j==j==j==j==j==j==

DIOGENO kaj ALEKSANDRO

La greka saĝulo Diogeno ne havis loĝejon, kiel aliaj homoj, sed loĝis en malnova barelo, ĉar li diradis: "La homo estas des pli feliĉa ju malpli da bezonoj li havas".

La reĝo Aleksandro volis vidi la saĝulon, kaj kun granda akompanantaro vizitis lin. Diogeno sidis antaŭ ŝia barelo kaj sin varmigis en la suno; li tute ne atentis la potencan gaston.

Via loĝejo estas malbona kaj viaj vestoj ankaŭ - diris Aleksandro - postulu, kiu vi volas; ne plenumos vian peton.

Mi bezonas nenion - respondis la saĝulo - sed se vi volas fari al mi plezuron, ne kovru al mi la sunon.

La reĝo admiris la noblan, neprofiteman homon kaj diris al siaj akompanantoj: "Se mi ne estus Aleksandro, mi dezirus esti Diogeno".

==&==&==&==&==&==&==&==